AŬSTRIA

ESPERANTO-REVUO

Oficiala organo de la aŭstria Esperanto-movado

Offizielles Organ der österreichischen Esperanto-Bewegung

Aperas monate

Redakcio kaj administracio: Vieno XV, Fünfhausgasse 16, Austrio. — Telefono R 33-3-64

8-a jaro JANUARO 1953 n-ro 1

Elementa postulo por ĉia propagando.

En "SVISA ESPERO" ni legis jenan artikolon, kiun ni volas konigi al la aústria Esperantistaro. La red.

"D-ro Lapenna skribis lastatempe, ke la venantaj jaroj estos decidaj pri la oficiala enkonduko de nia lingvo sur nia terglobo kondiĉe, ke la tutmonda Esperantistaro kunlaboros konstante kaj serioze por ĝia disvastigo. Lingva fakulo kiel d-ro Lapenna certe konas elfunde la internacian situacion sur la esperantista kampo kaj liaj vortoj estas bonvena stimulo por la junularo, kiu havos ŝajne la feliĉon, rikolti la fruktojn de multjaraj klopodoj.

Certe multaj inter ni estas bonvolaj Esperantistoj, kiuj kun fervoro defendas niajn ideojn. Sed la plimulto retiras sin pro neatenditaj obstakloj. Ili forgesas, ke nia laboro postulas ne nur entuziasmon, sed profundan konvinkon kaj civilan kuraĝon. Kaj kiom el ni povas pretendi, sen ruĝiĝo, posedi tiujn necesajn virtojn?

N i m e m estas la elirpunkto por ĉia propagando. Ni ezamenu nin, ĉu ni

a) scias la lingvon kontentige,
b) konas gian historian evoluon,
c) kredas senkondice je la estonteco de nia lingvo,
ĉ) maltimas eventualajn mokojn.

Valoras, mediti en trankvila angulo pri tiuj demandoj. Nia memoro kaj nia konscio donos la respondon. Ni estu sinceraj: ĉu ni vere havas la konvinkon, ke Esperanto fariĝos la mondlingvo? Se ni iom dubetas pri tiu punkto , estas

6a AÛSTRIA ESPERANTO-KONGRESO
kaj
Internacia Esperantista Renkonto
22. - 24. VII. 1953
en Klagenfurt - Karintio.

Loka Komitato: prezidanto: s-ano lernejdirektoro Leonhard SCHMID; sekretario-kasisto: s-ano Karl DÜRRSCHMID; komitatanoj: dir. Franz Watzinger , Alois RAMSCHAK.- Kongres-adreso:Karl Dürrschmid, Klagenfurt, Sternallee 5, Kongres-kotizo: S 15.-, familianoj S 8.--.

Provizora
K o n g r e s - P r o g r a m o :

Merkrede, 22.7.: akcepto de la kongressanoj;
ptm.: lagoekskurso, fakkunvenoj;
vesp.: amika kunveno.

Ĵaúde, 23.7. : mat. : katolika Diservo kun prediko en Esperanto;
atm.: solena malfermo de la kongreso;
tm. : komuna tagmanĝo;
ptm. : ekskurso al Magdalenenberg kaj kastelo Hochosterwitz;
vesp.: karintia kantvespero.

Vendrede, 24.7.: mat. : jarkunveno de AEF 1953; por eksterlandaj gastoj: lago-rondvojaĝo;
tm. : komuna tagmanĝo;
ptm. : AEF-jarkunveno, daúrigo;
vesp.: forveturo de la partoprenantoj al la 38a UK de E. en Zagreb.

nepre tempo, ke ni reviziu niajn Esperantajn konojn kaj opiniojn. Ja tie ĉi kuŝas la kaúzo pri nia indiferenteco al la Esperantista propagando. Nek profesio, nek manko de tempo estas kulpaj pri nia oportunemo,sed nia negativa kaj pasiva idearo pri Esperanto.

La unua plenumenda tasko estas, e s p e r a n t i g i n i n m e m per legado de niaj gazetoj kaj literaturo.Nur tiamaniere ni akiros la necesan persistemon, kiu estas la plej grava kvalito de ĉiu Esperantisto."

INFORMOJ DE LA ESPERANTO-CENTRO

El la protokolo de la decembra estrar-kunsido:AEF por la pasinta jaro ricevis de la urbo Vieno subvencion de 1.000 S. S-ano Fötinger, Salzburg,sendis al la E-Centro malneton por eldonota propagandilo. S-ano Mudrak akcep - tis la funkcion de peranto al la aústria sekcio de Internacia Civila Helpservo. Kasistino s-anino Loibel komun - ikas la saldon de la 17.12.52: S 863.70. De la konto de la socialista grupo estis prutita la sumo de S 670.-- por pago de diversaj fakturoj. La kostoj de AERevuo n-roj 11 kaj 12 estas S 636.90. Stacidomaj informtabuloj: s- ro Cech sciigas, ke pri la stato de tiu afero ankoraú ne venis detalaĵoj, ankaú ne pri la stato en la stacidomoj de Vieno.

Aústria Esperanto-Servo. La AEF-estraro ripetas la inviton de la austriaj ges-anoj akcepti la funkcion de "Delegito de la Aústria Esperanto-Servo". La delegito de AES havas la honorofican taskon, doni al petantaj ges-anoj en-kaj eksterlandaj informojn pri siah loko kaj regiono. Bonvolu konsideri, ke la praktika apliko de Esperanto estas la plej efika propagando por nia afero, kaj anoncu vin baldaége al la E-Centro. La eldono de "Informa Adresaro" estas projektita.

A U S T R I A E S P E R A N T O - K R O N I K O

VIENO: Ravag, Vieno: okazas radiodissendoj kun informoj , verkataj de s-ano Gustav Loibel kaj parolataj de s-ano Emil Vokal ĉiun merkredon je 22.35 (sendilo I). La sendstacio II disradias Esperanto-informojn kaj litera -

turaĵojn ĉiun duan mardon je la 16a-16.30 h(26.1.53 ktp.) Instigu viajn eksterlandajn geamikojn,keili aŭskultu nian Esperanto-RadioServon kaj petu ilin pri skribado al Ravag, Vieno IV., Argantinierstr. 30a.

VIENA ESPERANTO-DELEGITARO, la landa organizo de AEF,komencis per kunsido de l'7.1.53 sian agadon en la nova jaro.S-ano Hofrat Steiner faris la proponon,uzi la ŝancon,kiun Vieno havas per la Internacia Esperanto-Muezo, por efika propagando. Li atentigis, ke la muzeo kiel parto de la Aŭstria Nacia Biblioteko - do kiel institucio kun ofiviala karaktero - povas inviti la direkciojn de lernejoj,sindikatojn/kaj organizojn kaj asociojn diversajn,al kiuj Esperanto unuavice povas esti utila , por vizito. Tiu okazo ebligos plivastan varbadon por kursoj, kiuj alfluigos novan sangon en nian Vienan movadon kaj alkondukos al nia federacio novajn membrojn,kies kotizaj kontribuoj plifaciligos la ekonomion de AEF.Tiu propono trovis favoran akcepton kaj oni povas esperi,ke la paŝoj, tiucele entreprenotaj, estos sukcesaj.

La Vienaj grupoj kaj fakgrupoj estas petataj,delegi al la monataj kunsidoj,okazantaj ĉiun lan merkredon de la monato je 18.30 h en la E-Centro,miniume 1 membron. Oni petas pri regula trenssendo de la VED-kotizo de S -.20 po monato kaj membro.

"Danubio" registras vesperon "Per humoro en la novan jaron"(4.1.53),dum kiu s-anoj dir.Dittrich,Cech kaj Gasperini legis gajajn Esperantaĵojn. Speciale s-ro Gasperini surprizis la aŭskultantojn per prelego de du ĉapitroj el la fama humora verko "Don Camillo kaj Pepone", de li tradukitaj. - Kunvenoj okazas ĉiun lan kaj 3an dimanĉon en VII., Sigmundsgasse 13, je 10 h.

La Zamenhoffesto de la Vienaj Esperantistoj okazis, kiel jam tradicie, en la salonoj de Generalpostdirektio , I., Postgasse 8.Malfermite de nia honorprezidanto de AEF s-ro Sektionschef d-ro Dworschak, ĝi kiel kulminan travivaĵon prezentis la paroladon de s-ano prof. d-ro H a i n s c h e g g , veninta speciale el Graz al Viena. La gasto en germana kaj Esperanta lingvoj ĉeftemigis al sia bonega oratoraĵo la demandon, ĉu la afero, al kiu Majstro Zamenhof kaj ni, liaj fidelaj disĉiploj, kredas kaj dediĉas nian laboron, ne estas utopiaĵo,fiaskonta en la praktiko. Li montris,ke du lingvoj,artefaritaj por la praktika uzo

en la ĉiutaga vivo, unu kreola kaj indiana, pruvis sian plenan taŭgecon por interkompreno. Kompreneble tiuj lingne povis konkurenci kun Esperanto, kies subtileco kaj riĉo je nuancoj gin rangigas kiel kulturlingvo. La publiko entuziasme aklamis liajn vortojn. Pri la Majstro memorparola - dis inde ankaŭ s-ano Stefan Zodel, Vieno. Operkantistino

s-ino Stefanie Holeschovsky, akompanate per fortepiano de s-anino Hermine Peschl (Kalocsay-Laboro), prezentis du kantojn de Oskar Lenek ("Ho mia kor' "kaj "Kara Kristinfan" kaj "Vi mia pac' "("Du bist die Ruh' ") kaj "Al la muziko" de Franz Schubert. S-ino Jünger kaj s-ro Vokal kontribuis al la sukceso de la vespero per poemdeklamoj.

Esperanto-film-grupo, Antwerpestraat 45, Bergen op Z8om, Nederlando, eldonis filmstrion "Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno". Ĝi estas mendebla ĉe la supra adreso kaj kostas aŭstr. šil. 47.--. Interesitoj turnu sin al "TRAMONDO", adreso de la E-Centro.

STIRIO: Niaj mortintoj.En la tagoj de Kristnasko forpasis el niaj vicoj: s-ino Ida L e d e n i g , edzino de nia samideano Friedrich Ledenig, Schulrat en Leibnitz, kaj s-ro Alois K o u d e l k a , 81jara, estinta ŝuisto kaj la lasta estro de "Esperanto-Societo Emilo Peltier " en Graz, kiu devis esti likvidata pro la nazia reĝimo en 1938. Simpla homo, Koudelka tamen atingis preskaŭ perfektan posedon de Esperanto, kiun pruvis liaj multaj, neriproĉeblaj artikoloj en "Espero Katolika". La nun beate fordorminta samideano verkis ankaŭ specialan stenografion por Esperanto. Bedaŭrinde mankis la financaj rimedoj por publikigo de lia inventaĵo. Deantaŭ duona jaro ĉiam pli kaj pli malsana, nia amiko mortis en la urba malsanulejo, kiu ne informis nin. Tial kredeble neniu el ni povis lin akompani sur lia lasta iro. R. i. P. ! D-ro A. Halbedl.

SOCIALISTA ESPERANTISTARO AŬSTRIA

La socialista Esperanto-grupo kunvenos regule ĉiun 2an merkredon ĉiumonate,precize je la 19a h. en la E-Centro. La plej proksimaj kunvenoj okazos je la 11. 2. kaj 11.3.53. En la lastaj aranĝoj majstre voĉlegis gek - doj Jolanthe Leser kaj Stephan Zodel el mem verkitaj rakontoj kaj artikoloj. Oni traktis organizajn aferojn kaj finis

la kunvenojn per kantoj. Socialistaj gek-doj, via certa, regula partopreno estas atendata!

La Buroo de la Socialista Internacio montras intereson pri Esperanto. Tiun fakton ni dankas al la kuraĝa iniciato de k-do Peter Haberl, ĉefarangĝinto de la Esperanto-tendo en IUSY-Camp 1952 en Vieno. Li skribis leteron al la nomita sekretariejo kaj propagandis la uzon de la lingvo internacia. El tio rezultis, ke la internacia sekretario Julius Braunthal jam ŝangĝis tri leterojn kun k-do Haberl pri la Esperanto-demando. Ni esperu do, ke el tiu ĉi signifoplena leterintersango, kiun nun transprenas la oraganizo de la socialistaj Esperantistoj, elkresku fruktodona rezulto por Esperanto ! La estraro.

KATOLIKA ESPERANTISTA VIVO

AKLE-Vieno, leteradreso W. Mudrak, Vieno III.,Beatrixg.19 kunvenas ĉiun 2an kaj 4an mardon de la monato je 17-19.15h en I., Graben 13/25 (Kreuzbundheim). Ĉiumarde samloke de 19.15-20.30 h elementa E-kurso . Arangĝoj: okazis Diservo la 14.12.52 kun S.beno kun E-prediko signifa priadventa de P. Komandoro G. Plank (partoprenis pli ol 40 ges-anoj); adventvespero 9.12. kaj Kristnasko-festeto 30.12.52.

XXIVa Internacia Kongreso de Katolikai Esperantistoj okazos de 12.-16.8.53 en L o u r d e s .Kotizo ĝis 1. 2.53 fr.frankoj (proks.S 50.-supozeble).Detaloj sekvos .

"Espero Katolika": Ne forgesu la reabonon ! Pojare S 30.--, pageblaj al la supra adreso, resp. al Postsparkassa-Konto 105.713.

Gazetara servo: "Die österreichische Furche",Vieno, 29.11.52 pri "Spiritaj Ekzercoj" de S. Ignacio de L.en E. kaj alia katolika E-literaturo (19 lin.). "Der Weg" (de pastroj Franciskanoj), Vieno oktobro 52 : pri katolika Diservo en Aústralio kaj E., P. Cap.Sigismund,respektive pri E-rondo subtera en K.Z. Dachau (16. lin.)."Kalasantiner Blätter", Vieno, novembro 52, "40 jaroj katolika E-movado en Aústrio (14 lin.). "Der Volksbote", Innsbruck , 23.11.52, pri "Koordinierte E-Kurse" (17 linioj). W. M.

SOCIETO DE AUSTRIAJ ESPERANTO-INSTRUISTOJ

dokumentas per siaj sukcesoj sur sia speciala agad-kampo viglan kaj energian laboradon. "Aŭstria Esperanto-Instru-

isto", la enhavoriĉa, hektografita organo de la societo, aperis ĝis nun en kvin numeroj. La lasta citas kvar publikigojn en fakgazetoj, atentigas pri la starigita centro Esperanta interkorespondado, Vieno I.,Schwarzenbergstr.5, kaj donas al la gekolegoj valorajn instigojn kaj konsilojn. Niaj instruistoj kaj instruantoj agos bone, kontaktigante sin kun la societo por reciproka profito.Adreso:E-Centro.

La Esperanto-laboro en la Kongreso de la Popoloj por la Paco, Vieno, decembro 1952.

Raporto de d-ro Halbedl, Knittelfeld: La 12. 12. mi partoprenis la antaŭkonsiladon de la aŭstria delegitaro en kafejo Landmann kaj tie proponis, ke nia delegitaro persvadu la kongreson por la uzo de Esperanto flanke de la partoprenantaj Esperantistoj kaj por ĝia (de E.) rekomendo pri la ĝenerala enkonduko kiel dua lingvo por ĉiu en la lernejoj de la ŝtatoj, el kiuj venis la delegitoj al la packongreso. Sed bedaŭrinde la estraro de la kunsido ne konsentis, ĉar laŭ ĝi la lingva problemo nur estas flanka. Post mia foriro el la kafejo kongresejon iama s-ano Hochrainer, Sierning apud Steyr, oficiala delegito de KZ-Verband kaj s-roj Pelkhofer kaj Eder el Traismauer defendis mian sugeston. Ili konatigis sin al mi pro mia "kuraĝa faro" kaj promesis, daŭrigi miajn klopodojn ĉe la kongreso post mia forvojaĝo el Vieno.

La 13.12. mi skribis leteron al la prezidantaro de la kongreso, petante, ke oni lasu min diri paroladeton, kiun mi estis preparinta. La prezidantaro fakte atentis mian leteron, ĉar kongresanoj laŭdis min pro mia ago koncerna. Sed mi ne parolis, ĉar la 14.12. la kunsidoj estis komencataj nur post mia foriro al la stacidomo, kaj vespere mi devis esti en Knittelfeld.

Kvankam estas evidente, ke multaj delegitoj venis al Vieno kun fiksita marŝordono, la kongreso tamen tre bone impresis min, ĉar dum mia ĉeesto regis perfekta libereco de parolo. Precipe mi estas kontenta pri la propra sperto, ke la teknikaj aparatoj de aŭdiloj kaj kvinlingva tujtraduko estas nur malperfekta kaj malsufiĉa anstataŭaĵo de Esperanto. Eĉ la vortare bonaj tradukoj - ne ĉiuj meritas tian rekonon - kripligis la ofte elokventajn paroladojn kaj forprenis de ĉiuj la efikon de la senpereco.Tial la ora-

toroj estis elokventaj nur por siaj samlingvanoj aŭ por la majstroj de la parolataj lingvoj; sed de tiaj partoprenis ne tre multaj. Tro multaj kongresanoj tial estis nur vato.

S-ano Emil Vokal, Vieno: Prepare al la kongreso okazis en Volkshochschule Ottakring kunveno, al ku mi prezentis alvokon, pledantan por la uzigo de Esperanto por la celoj de la pacomovado. Ĝi estis aplaŭde akceptata. Alia kunveno en gastejo Orfandl, Mariahilferstrasse,al kiu mi same prezentis la aludiţan apelon, favoran al Esperanto, senescepte subskribis ĝin. Ĝi estis sendata al la prezidantaro de la kongreso.La apelo,cetere,estis akceptata en la kongresa sekretariejo por multobligo en germana lingvo kaj almeto al la kongrespaperoj de 500 kongresanoj. La 13.12. la inciata komitato de Esperantistoj por la kongreso sendis salutte legramon al ĝi, kiu, germanlingve, interalie diris: "Al ĉiu popolo ĝian lingvon - al la homaro Esperanton!Interparoli-kompreni- paco. " Salutoj por la kongreso venis de Esperantistoj kaj E-organizoj el Francio, Bulgario, Germanio kaj Finnlando.

Kvankam pro diversaj kaŭzoj ne estis eble, interkontaktigi ĉiujn partoprenintajn Esperantistojn, tamen ni sukcesis la 15.12, en la E-Centro kunvenigi 50-on da ges-anoj, kiuj havis la sancon interparoli kun gastej el Britio, Nederlando, Italio kaj, traduke, ankaŭ el Indonezio.

S-ano Antonio Balague,St. Pölten, en "Informilo"l de la ĵus fondita "Esperantista Pacrondo de Aústrio"(konrespondadreso: Steffi Krautschneider,Vieno I.,Aegidyg.12), mencias,ke ne estis eble al la Esperantista komitato,fari pli efikan laboron pro tio,ĉar la delegitaro por la kongreso estis treege minimumigita kaj tial oni ne povis atingi delegitan lokon.S-ano Vokal sukcesis,dum 1 horo esti en la kongreso,kaj li mem ricevis permesilon por unu tago,sed li vane klopodis,penetri gis s-ino Cotton.Aldone al la jam komunikitaj agoj li sciigas,ke s-ro d-ro Halbedl sukcesis loki en "Österreichische Friedenszeitung"mallonge antaŭ la kongreso Esperanton rekomendantan artikolon.

Eigentümer und Herausgeber: Österr.Esperantistenverband. Verlag: "Tramondo". - Verantwortlicher Redakteur : Hugo Kraus, sämtliche W i e n XV., Fünfhausgasse Nummer 16
Druck: Offset Vervielfältigung, ADRESSEN-SUPPAN Wien IV., Brucknerstrasse 2, U 41-2-70